



Estrara Komunikado EKO 2016-27 sendita el Poznano la 22an de septembro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj.

## Cent minutoj por la Jaro de la Lernanto

Diskutoj ekis pri la manieroj kuraĝigi niajn novajn retajn lernantojn plustudi la lingvon, ekkoni la ecojn de la parol-komunumo kaj eventuale eniri tiun unikan rondon. La diskutantoj estas eminente kvalifikitaj por alfronti la demandaron, ĉar ili nun plenumas la lastan jaron de la trijara postdiploma studado en la universitato UAM en Poznano, en okcidenta Pollando, kiuj elektis la specialiĝon pri instruado. Aldoniĝis admirinda nombro da partoprenantoj (19) el la unujara kurso pri Instruista Trejnado. Sume, temis pri 22 personoj – eĵn kelkaj el ili:



Entute, oni rajtas tre kontenti pri la kvanto kaj kvalito de la kursanoj; pli granda nun ol iam ajn tra la lasta dudeko da jaroj, krome rekorde bonas la proporcio de trijaraj studantoj, kiuj persistis kaj atingis la lastan studjaron. En tiu lasta jaro funkcias specialiĝoj, pri E-literaturo, E-lingvistiko, Internacia kaj Interkultura Komunikado, krome al la jam menciita Instruista.

Pli plenaj informoj pri la studsemajno, regule kompletigataj, troveblas ĉe <edukado.net> en la sekcio 'Novaĵoj'.

En tiu centminuta sesio la projekto de UEA pri la Jaro de la Lernanto ricevis prezenton, laŭ la lanĉa artikolo el la julio-aŭgusta revuo *Esperanto*, flanke de ĝia vicprezidanto. Skizitaj estis la celoj de la jaro, iuj el la konkretaj planoj, kunlaborproponoj por landaj kaj fakaj asocioj, por lokaj grupoj kaj unuopuloj. Laste estis prezentita la skemo de dekduo da aranĝoj, kie la temaro de la Jaro venos en

diskuton – tiuj troviĝas en ĉiuj kvin kontinentoj. Al tiu listo aldoniĝos la ĵusa kaj ĵuse aldonita sesio en Poznano, kie en februaro 2017 la Jaro ricevos duontagan programaron en la sekva studsesio.

Duono de la disponebla tempo estis dediĉita al grupa diskutado laŭ la subaj temoj. Ĝi koncentriĝis al la kontaktado de retaj kursfinintoj, unu grupo esploris la komencajn fazojn – kiel teni la scivolemon kaj vastigi la oferton de studebloj. La dua grupo pensis pri la plipostaj stadioj: kiel proponi al ili trovi vojojn eniri la komunumon. Ambaŭ grupoj devis zorgi pri skriba protokolado kaj reraportado, sekve ni povas nun listigi la komence prezentitajn demandojn kaj la reagojn. Jen la grupoj arde diskutas:



## **Kiel stimuli plustudadon ĉe retaj lernantoj?**

### *Kion proponi pli ol la baza kurso?*

Ili spertu internacian etoson. Proponu konkretajn eblojn, eĉ taskojn. Proponu stipendiojn por partopreni eventojn. Proponu karieron en la E-movado. Malkovri, kiuj havas kompetentojn.

### *Kiel atingi tiujn homojn?*

Aperigi anoncojn en lokoj, kie ili vidos tion. Necesas krei konvenajn informilojn. Kaptu iliajn atentojn en sociaj paĝoj kiel *Facebook*, *Ipernity* ks. Pri zorge atentu, ke niaj retpaĝoj, precipe la eksterendirektaj, restu ĝisdataj kaj trafaj.

### *Kiel konigi la komunumon?*

Donu informojn pri konvenaj renkontiĝoj, IJK, SES, JES ktp. Adekvate prezentu tie pliajn eblecojn, varbi membriĝon.

### *Kiuj partoj de niaj agadoj plaĉos?*

Vojaĝebloj, eblo ekesti delegito.

### *Kiel proponi virtualajn aŭ fizikajn kontaktojn?*

Proponu konversacian ekzercon kaj pluan lernadon, ekzemple per la projekto 'Ekparolu' (vidu sube).

## **Kiel aktivigi kaj entiri retajn lernantojn?**

### *Kiel proponi movadan vivon?*

Altiri homojn per allogaĵoj kiuj estu modernaj kaj aŭtentikaj. Ligi la lingvon kun artoj, aranĝoj, muziko. Uzi retajn ligilojn por montri, ke la lingvo estas uzata en ĉiuj kampoj. Montru fizike aŭ rete specimenojn de revuoj.

### *Kion proponi? Kiuj proponu?*

Kategoriigu la proponojn laŭ la aĝoj de la novuloj. Proponu kontaktojn kun fakuloj pri Esperanto en la regiono de la novulo. Proponu fakulojn kun similaj interesoj al la novulo.

### *Kiel bonvenigi ilin al niaj servoj, eventoj?*

Konsultu librojn pri merkatico. Prepari flugfoliojn, reklami pere de la reto; uzo de *Facebook* kaj *Twitter*.

### *Kiel ekkoni iliajn interesojn kaj talentojn?*

Proponu retan enketilon, ekzemple ĉe *Google Drive*, por koni la novulon pli bone.

*Kio motivis ilin al esploro pri Esperanto?*

Simile, uzu retan enketilon.



Ĉiuj fotoj: Stefan MacGill

Ene de la studsemajno, plia sesio, sub gvido de Katalin Kovats, montris praktike la programon 'Ekparolu', kiu rekte plenumas la celon, kiun diskutis la unua grupo. Serio de onkloj kaj onkloinoj (spertaj esperantistoj – inter kiuj instruistoj), kun kiu rajtas konversacii kaj ĉe kiu starigi demandojn la sinanoncintaj kursfinintoj.

Vortoj: 680

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Tutmonde Samkondiĉe 4.0. Por pli da informoj vidu ĉe: [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>](https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/).